

Grant Goodall

University of California San Diego, Usono / USA

Esperanto kaj lingvistiko: cent jaroj da (mal)amikeco

Resumo: La rilatoj inter la lingvistiko kaj tiuj kiuj uzas kaj evoluigas helplingvojn kiel Esperanton estis relative amikaj dum la komencaj jaroj, multe malheliĝis dum la postaj jardekoj, kaj nun ŝajne eniras pli kunlaboran kaj esperdonan periodon. En la komencaj jaroj, estis multe da reciproka influo kaj kunlaboro, sed dum la fruaj jardekoj de la 20a jarcento, la sinteno de lingvistoj rilate al Esperanto rapide fariĝis negativa, parte pro la tradiciaj deklaroj de esperantistoj pri sia lingvo kaj parte pro neeviteblaj konfliktoj inter la celoj de la lingvistiko kaj la stato de Esperanto kiel lingvo. Fine de la 20a jarcento, tamen, tiu situacio komencis ŝanĝiĝi, pro ŝanĝoj kaj inter esperantistoj kaj inter lingvistoj. Esperantistoj pli malofte esprimis ideojn pri lingvolernado, pri la logikeco de Esperanto, kaj pri la diverseco de lingvoj en la mondo kiujn lingvistoj trovas ŝoke neakcepteblaj. Intertempe, en la lingvistiko, ideoj pri lingvolernado kaj pri konstruitaj lingvoj maturiĝis tiomgrade ke oni nun povas almenaŭ imagi ke Esperanto iam fariĝos ordinara temo en la esplorkampoj de lingvistiko.

Ŝlosilvortoj: Lingvistiko; Esperanto; Lingvolernado; Lingvodiverseco; Konstruitaj lingvoj; Chomsky.

1 Enkonduko

La historio de la rilatoj inter lingvistiko (t.e. la studkampo kiu klopodas esplori la naturon de la homa lingvokapablo) kaj tiuj kiuj konstruas kaj evoluigas helplingvojn por internacia uzo, specife Esperanton, estas interesa kaj instruplena. En ĉi tiu artikolo, mi donos skizitan superrigardon pri tiu historio, emfazante kelkajn aspektojn de ĝi kiuj estas aparte atentovekaj el nia nuntempa perspektivo.¹ Kiel ni vidos, la rilatoj inter la du grupoj estis relative amikaj dum la komencaj jaroj sed multe malheliĝis dum la postaj jardekoj. Lastatempe, tamen, estas diversaj signoj kiuj pensigas ke oni nun eniras pli kunlaboran kaj esperdonan periodon.

1 Mian aliron certe influas mia persona historio pri la temo, pro tio ke mi parolas Esperanton ekde proksimume 1969 kaj aktivas en lingvistiko ekde proksimume 1975 (unue kiel studento kaj poste kiel profesoro). Mi tamen klopodas laŭeble doni referencojn por ke miaj konstatoj estu bazitaj sur dokumentitaj faktoj kaj ne nur sur miaj personaj spertoj kaj impresoj.

2 Komenca periodo: reciproka influo kaj kunlaboro

Malofte agnoskata fakto pri Esperanto kaj aliaj internaciaj lingvoj de la 19a jarcento estas ke ili ne ekzistus tiel kiel ni konas ilin sen la influo de la tiama lingvoscienco. Konstrui lingvon ne estas facila afero – nuntempe eĉ ekzistas apartaj libroj kiuj instruas kiel tion fari, kiel ekzemple Peterson (2015) – kaj havi iom da scio pri lingvistiko kompreneble utilas. Lingvokreantoj el tiu periodo, kiel Schleyer kaj Zamenhof, ne havis tian scion, sed ili tamen estis ĝenerale edukitaj homoj (kun instruiteco pri multe da lingvoj, interalie) kaj ili estis forte influitaj de la tiame regantaj ideoj pri lingvoj (Falk 1995), ekzemple pri aglutineco kaj reguleco. Tion oni povas vidi en la strukturo de la lingvoj mem.

En Esperanto specife, oni vidas tiujn spurojn de la tiama lingvoscienco en almenaŭ du aspektoj de ĝia strukturo (vidu ankaŭ van Oostendorp 2000). Unue, ĝi fidele sekvas la “aglutinan idealon,” en kiu ĉiu afikso portas unusolan signifon en relative senŝanĝa formo. Zamenhof eksplicite menciis tion en siaj priskriboj de la lingvo: “la diversaj formoj gramatikaj [...] estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj” (Zamenhof 1903, 234). Oni facile vidas tion en vorto kiel *interesiĝantojn*, kiu konsistas el sep senŝanĝaj morfemoj (*interes-iĝ-a-nt-o-j-n*). Due, la strukturo de Esperanto rigore sekvas la “regulan idealon,” en kiu lingva reguleco estas alte taksata kaj iu ajn nereguleco estas konsiderata kiel difektaĵo kaj barilo al rapida alproprigo. Ekzemple, verboj en Esperanto ĉiam uzas la samajn finaĵojn por indiki la tempon, eĉ kiam temas pri tre ofta verbo (ekzemple, *havas, havis, havos*). Nuntempe, oni ofte rigardas aglutinecon kaj regulecon malsame (vidu Pinker 1999; Yang 2016). Tamen, fine de la 19a jarcento, tiuj idealoj estis vaste akceptataj en lingvoscienco kaj havis palpeblan influon en la strukturo de Esperanto kaj aliaj similcelaj lingvoj de tiu tempo (Falk 1995).

La interplektiĝon de lingvistiko kaj Esperanto oni ankaŭ povas vidi je persona nivelo. Ferdinand de Saussure, la tiel nomata “patro de la moderna lingvistiko,” konsciis kaj laŭdire interesiĝis pri Esperanto (F. de Saussure 1916; Astori 2018) kaj lia frato René estis inter la unuaj Esperantaj gramatikistoj kaj ankoraŭ nuntempe unu el la plej gravaj (van Oostendorp 2018). La ideoj de René lastatempe komencis influi ankaŭ la ĝeneralan lingvistikon (Anderson kaj L. de Saussure 2018). Pri aliaj internaciaj planlingvoj, estis eĉ pli senperaj rilatoj inter lingvistoj kaj la lingvoj mem. La tre konata lingvisto Otto Jespersen dediĉis multe da energio al la temo kaj eĉ kreis Novial, sian propran lingvoprojekton (Jespersen 1928), kaj eminentuloj kiel Edward Sapir kaj André Martinet kontribuis al la laboro de la International Auxiliary Language Association (Internacia Helplingvo-Asocio), el kiu fontis Interlingua (Sapir 1925; Falk 1995).

3 Dua periodo: kreskanta malvarmiĝo

Malgraŭ la partopreno de kelkaj individuaj lingvistoj en la komencaj jardekoj la 20a jarcento, la ĝenerala sinteno de lingvistoj rilate al Esperanto rapide fariĝis negativa. Hermann Collitz, la unua prezidanto de la Linguistic Society of America (Lingvistika Societo de Usono), deklaris en sia oficiala prezidenta parolado (kaj poste en la revuo *Language*) ke “la kunnaskita spirito de lingvoj kiel Volapük aŭ Esperanto estas malamika al la lernado de lingvoj. Ili koviĝis en la kredo ke la lernado de fremdaj lingvoj estas ĝena kaj malfacila tasko” (Collitz 1925, 11).² La opinio de Collitz kompreneble ne estis tute sensenca. Se lingvolernado ne estus “ĝena kaj malfacila tasko,” lingvoj kiel Volapük aŭ Esperanto kiuj celis esti facile lerneblaj ne havus grandan ekzistokialon. Se oni akceptas ke lernado de aliaj lingvoj estas “ĝena,” oni povas alveni sen granda salto al la konkludo ke esplorado de ilia strukturo estas tempomalŝparo, kaj tio komencas endanĝerigi la lingvistikon mem.

La tradiciaj argumentoj kaj sloganoj de esperantistoj certe ne konsolus Collitz kaj tre verŝajne motivis lian publikan elpaŝon pri la temo. Dum tiu tempo, esperantistoj parolis tre malkaŝe pri la supozataj malfacileco aŭ eĉ senutileco de lernado de aliaj lingvoj kaj tial proponis Esperanton kiel alternativon (por pli da detaloj pri la uzo de la nocioj “facileco” kaj “malfacileco” en la historio de Esperanto, vidu Sikosek 2001). Indas mencii ke Collitz, kiel multaj lingvistoj en Usono tiutempe, laboris en fako pri fremdaj lingvoj en sia universitato (pri la germana, liakaze), kaj tial povus tute kompreneble konsideri tiujn tradiciajn argumentojn de esperantistoj rektan atakon al li kaj al liaj samfakuloj.

Eĉ dum postaj jardekoj, kiam memstaraj fakoj pri lingvistiko fariĝis pli oftaj kaj lingvistoj plejparte trovis siajn postenojn tie, la sloganoj de esperantistoj ofte koliziis kun la plej kernaj kaj karaj ideoj de lingvistoj. Ekzemple, esperantistoj ofte laŭdis la strukturon de Esperanto, dirante ke ĝi estas logika kaj racia (ekzemple Boulton 1962; Francini 1978; kaj aliaj ekzemploj priskribitaj de Large 1985 kaj Sikosek 2001). Por lingvistoj, tamen, tiaj eldiroj estis naivaj aŭ sensencaj (se ne ofendaj). Kiel oni povas diri ke la specifaj strukturaj trajtoj de Esperanto, kiel ekzemple ĝia kaza sistemo aŭ ĝiaj postsubstantivaj rilataj propozicioj, estas pli “logikaj” aŭ “raciaj” ol tiuj de aliaj lingvoj? Cetere, se oni konsideras ke tiuj strukturaj elektoj de Esperanto kutime respegulas la modelon de eŭropaj lingvoj, estas facile interpreti la fanfaronadon de esperantistoj pri logikeco kiel lingve imperiisman perspektivon pri la mondo.

2 “The innate spirit of languages like Volapük or Esperanto is hostile to the study of languages. They were hatched in the belief that the study of foreign languages is an irksome and difficult task.” La tradukon el la angla faris la aŭtoro.

Supozeble eĉ pli ŝokaj por lingvistoj estis la tradiciaj deklaroj pri “unu lingvo por la tuta mondo” kaj pri la multeco kaj diverseco de lingvoj kiel “obstinaj baroj” al komunikado kaj interkompreniĝo (vidu pritrakton de tiaj deklaroj en Sikosek 2001). Lingvistoj ege konscias pri la endanĝerigata stato de multaj lingvoj kaj pri la rapide ŝrumpanta lingva diverseco en la mondo, kaj multaj aktive laboras por konservi lingvojn kaj reagi al kreskanta lingva unueco. Tiusence, ne estas surprize ke sloganoj pri unusola monda lingvo ne estis tre allogaj por lingvistoj.

Tamen, ne ĉio el la hezitemo de lingvistoj rilate al Esperanto ŝuldiĝas al la deklaroj de esperantistoj. Parto ŝuldiĝas al neevitebla konflikto inter la celoj de la lingvistiko kaj la stato de Esperanto kiel lingvo. Dum la 20a jarcento, lingvistiko pli kaj pli fariĝis esploragado kiun oni faris kunlabore kun denaskaj parolantoj de lingvo. Tio komenciĝis frue en la jarcento – vidu ekzemple Sapir (1921) kaj Bloomfield (1933) – pro la deziro dokumenti antaŭe ne priskribitajn lingvojn kaj pli bone kompreni la eventualajn limojn de la homa lingva diverseco. Tio daŭris dum la dua duono de la jarcento, kiam pro la influo de Noam Chomsky, oni volis pli eksplicite kompreni la mensan lingvokapablon de denaskaj parolantoj (Newmeyer 1986; Anderson 2021). Por plifaciligi tiun kompleksan taskon, lingvistoj dum jaroj plejparte fokusis la atenton al relative simplaj kazoj: homoj kiuj denaske parolas nur unu lingvon kaj kiuj loĝas en medio kie oni ĉefe parolas nur tiun lingvon.

En tia esplortereno, Esperanto malfacile trovas lokon. Kvankam ekzistas homoj kiuj parolas ĝin denaske, ili kutime estas denaske almenaŭ dulingvaj kaj ili neniam kreskas en medio en kiu oni parolas nur Esperanton. Cetere, ili verŝajne neniam konsideras Esperanton sia plej forta lingvo (vidu Versteegh 1993; Corsetti 1996 kaj, por superrigardo, Goodall 2023). El la perspektivo de lingvisto, do, Esperanto ne estis aparte facila aŭ taŭga esplorobjekto, ĉar mankas la klare difineblaj denaskaj parolantoj kiuj ebligas esploradon en aliaj lingvoj. Lingvisto eble povus bedaŭri tiun situacion, sed ne tro, ĉar estas miloj da aliaj lingvoj kiuj urĝe bezonas atenton. Se oni devas flankenlasi Esperanton, eble estas domaĝe, sed oni facile sentas sin logita de amaso da lingvoj en kiuj denaskaj parolantoj abundas.

4 La nuntempo: multaj ŝanĝoj ambaŭflanke

En la antaŭa sekcio, ni vidis la situacion dum granda parto de la 20a jarcento. Multaj lingvistoj facile povis kompreni Esperanton kiel atakon kontraŭ iliaj intereso, sed eĉ se ne, la tradiciaj deklaroj de esperantistoj pri sia lingvo povis impresi kiel naivaj aŭ sensencaj (Forster 1982; Sikosek 2001). Cetere, Esperanto estis malfacile explorebla el lingvistika vidpunkto pro la manko de unulingvaj denaskaj parolantoj, do lingvistoj emis ne atenti ĝin. Fine de

la jarcento, tamen, tiu situacio komencis ŝanĝiĝi, pro ŝanĝoj kaj inter esperantistoj kaj inter lingvistoj.

En la Esperanto-movado, multaj el la tradiciaj argumentoj por la lingvo komencis forfali dum la lastaj jardekoj de la 20a jarcento (Sikosek 2001). La ideo laŭ kiu ĉiuj devus lerni nur Esperanton kiel duan lingvon kaj tiel eviti lernadon de aliaj lingvoj fariĝis multe malpli populara, kaj la ideo laŭ kiu Esperanto povus helpi kaj stimuli lernadon de aliaj lingvoj multe disvastiĝis (Frank 1987). Simile, oni komencis pli sobre analizi la strukturon de Esperanto kaj rekoni ke multaj el ĝiaj trajtoj fontas el ĝia eŭropa bazo kaj ne el ia unike logika karaktero de la lingvo (Piron 1977; Wells 1978). Pri la multeco kaj diverseco de lingvoj en la mondo, malplioftiĝis la ideo ke tio estas bedaŭrinda problemo kaj plioftiĝis la ideo ke ĝi estas io respektinda kaj protektinda, kaj ke Esperanto povas ludi rolon en ties protektado. Tiuj novaj ideoj en la Esperanto-movado estis sendube multe pli amikaj al la kutimaj pensmanieroj de lingvistoj.

Ankaŭ en la mondo de lingvistoj estis diversaj ŝanĝoj, aparte pri aliroj al lingvolernado, kiuj favoris la eblecon konsideri Esperanton serioza esplorobjekto. Unue, la kompreno pri la strukturo de lingvoj kaj pri la ĝenerala homa lingvokapablo evoluis ĝis tioma grado ke oni povis fruktodone studi ne nur denaskajn parolantojn, sed ankaŭ tiujn kiuj alproprigis la lingvon poste – ekzemple, kiel plenkreskuloj (White 1989). Tiu paŝo malfermas la pordon al esplorado pri Esperanto, pro tio ke ĝiaj parolantoj plejparte lernis ĝin post la infanaĝo. Due, novaj eltrovoj en lingvistiko ebligis gravajn esplorojn ankaŭ pri dulingvuloj, kun aparta atento al ilia kapablo en ambaŭ lingvoj. Ĉar ĉiuj parolantoj de Esperanto, inkluzive de denaskuloj, estas minimume dulingvuloj, ankaŭ Esperanto povus inkluziviĝi en tiu esplorkampo, almenaŭ potencie. Trie, rezulte de la faktoroj jam menciitaj, oni komencis trakti tre zorge la fakton ke lingvolernado ofte okazas en tute neidealaj aŭ netradiciaj cirkonstancoj. Ekzemple, multaj infanoj lernas unu lingvon en la hejmo kaj alian lingvon en la ekstera komunumo, kaj tio signifas ke ili “plentempe” okupiĝas pri nek unu lingvo nek la alia. Tiun fenomenon oni komencis detale studi (ekzemple Polinsky 2018). La graveco de tio por Esperanto estas memevidenta: eĉ denaskaj parolantoj de Esperanto lernas la lingvon en ĝuste tiuj neidealaj kaj netradiciaj cirkonstancoj (Goodall 2023).

Indas emfazi ke la tri ŝanĝoj ĵus prezentitaj en la pritrakto de lingvolernado en lingvistiko ne tuj kondukis al amaso da novaj esploroj pri Esperanto fare de lingvistoj. Tamen gravas ke tiaj studoj fariĝis almenaŭ imageblaj, eĉ se ili estas ankoraŭ apenaŭ konstateblaj en la realo.

Alia tereno kie okazis interesaj ŝanĝoj en lingvistiko rilatas al konstruado de lingvoj. Tradicie, lingvistoj okupiĝas pri “naturaj” lingvoj, tiuj kiuj ekzistas sen ia aparta interveno en homaj komunumoj kie ajn ili troviĝas,

sed lastatempe, ili interesiĝas ankaŭ pri konstruado de novaj lingvoj. Tio okazas pro du kialoj. Unue, fakuloj pri lingvolernado konstatis ke povas esti utile konstrui lingvon kun iuj specifaj trajtoj, kaj en eksperimento, prezenti ĝin al partoprenantoj kaj vidi kio okazas kiam ili klopodas lerni ĝin. Tiaj eksperimentoj havas plurajn avantaĝojn: kaj la strukturaj trajtoj de la lingvo kaj la lingva medio prezentata al lernantoj povas esti zorge formulitaj, kaj oni povas preskaŭ sammaniere testi infanojn kaj plenkreskulojn (Culbertson kaj Schuler 2019). Fakte, kelkaj el tiuj eksperimentoj estas aparte signifoplenaj por Esperanto ĉar ili esploras lingvolernadon en kondiĉoj en kiuj morfologiaj finaĵoj estas neregule aŭ nur sporade uzataj (ekzemple, Hudson Kam kaj Newport 2005). Tia estas la medio en kiu oni ofte lernas kaj uzas Esperanton, ĉar iujn finaĵojn (plej fame la akuzativan *-n*) oni jen uzas kaj jen neglektas en la reala lingvouzo.

Due, pro diversaj kialoj, konstruitaj lingvoj fariĝis multe pli bezonataj en romanoj, filmoj, kaj televid-serioj (ĉefe pro la kreskanta populariĝo de sciencfikcio kaj fantazio kiel ĝenroj), kaj tiuj industrioj ofte dungas lingvistojn por tiu celo. Multaj lingvistoj ekinteresiĝis pri la afero kaj rimarkis ke temas pri nova, praktika utiligo de lingvistiko kiu povas interesi kaj universitatajn studentojn kaj la ĝeneralan publikon. Kursoj pri lingvokonstruado jam estas relative oftaj en fakoj pri lingvistiko en universitatoj (Punske, Sanders, kaj Fountain 2021). Rezulte de ĉio ĉi, konstruado de lingvoj nun estas iom konata temo inter multaj lingvistoj, kaj la historia origino kaj “artefariteco” de Esperanto impresas malpli strange al nuntempaj lingvistoj ol al tiuj de antaŭaj generacioj. Kiel signo pri tio, laŭinvita artikolo pri konstruitaj lingvoj lastatempe aperis en prestiĝa revuo pri lingvistiko (Goodall 2023), io kio estus apenaŭ imagebla dek jarojn antaŭe.

Estas neeble fini ĉi tiun sekcion sen mencii la konatan eldiron de Noam Chomsky, sendube la plej fama lingvisto de la 20a jarcento kaj poste, ke “Esperanto ne estas lingvo.” Kredeble tiun eldiron konas ĉiu esperantisto kiu iom interesiĝas pri la nuntempa lingvistiko (diskuto pri ĝi okupas grandan parton de la artikolo pri Chomsky en la Esperanta Vikipedio, ekzemple). Tamen en pli ĝeneralaj lingvistikaj medioj, la eldiro estas verŝajne tute ne konata, eĉ inter tiuj kiuj tre detale sekvas la diverstemajn ideojn kaj opiniojn de Chomsky. Unu kialo povas esti ke la eldiroj okazis en spontaneaj intervjuoj kiuj nur tre malmulte disvastiĝis poste (en presita aŭ videa formo). En formale eldonitaj libroj kaj artikoloj, laŭ mia scio, Chomsky eĉ ne unu fojon mencias Esperanton. Alia kialo povas esti ke la eldiro verŝajne estus banalaĵo por preskaŭ ĉiuj lingvistoj. Se oni komprenas “Esperanto” kiel “tio kion L. L. Zamenhof proponis al la mondo en 1887,” kaj la kunteksto de la intervjuo supozigas ke ĝuste tiun signifon Chomsky celis, estas memevidente ke tiu “Esperanto” vere ne estas lingvo, sed nur

aro da vortoj kaj kelkaj ideoj pri morfologio. Laŭ la konceptoj de Chomsky (kaj fakte preskaŭ ĉiuj lingvistoj, ĉu ili konsentas kun Chomsky pri aliaj aferoj aŭ ne), vortaroj kaj / aŭ gramatikoj ne estas lingvo; ili simple registras kelkajn faktojn kaj observojn pri la lingvo kaj nur tre nekomplete priskribas la enmensan lingvokapablon de la parolanto. Pro tio, estas banala la konstato ke la Zamenhofa propono de 1887 ne estis lingvo, kaj lingvistoj ĝenerale nek surpriziĝus nek multe interesiĝus pri la eldiro de Chomsky eĉ se ili sciis pri ĝi.

Lastatempa komento de Chomsky povas ĵeti iom da lumo al la afero. En publika retpoŝto responde al peto de Probal Dasgupta, li diris ke “[...] kelkajn el miaj mallongaj komentoj pri la originoj de Esperanto oni mise interpretis kiel malaprobon de la lingvo aŭ de projektoj kiuj uzas Esperanton por plifaciligi la evoluon de lingvaj kapabloj. Tia implico neniam ekzistis kaj neniam estis mia intenco.”³ Tiu komento subtenas la ideon ke lia antaŭa eldiro rilatis nur al 1887 kaj ne al la posta aŭ nuntempa Esperanto. Estas ankaŭ rimarkinde ke li mencias Esperanton kiel “lingvon” en la nova komento.

Pro diversaj kialoj, do, la eblecoj por interkompreniĝo inter esperantistoj kaj lingvistoj multe pliboniĝis dum la lastaj jardekoj. Esperantistoj nun malofte esprimas ideojn pri lingvolernado, pri la logikeco de Esperanto, kaj pri la diverseco de lingvoj en la mondo kiujn lingvistoj trovas ŝoke neakcepteblaj. Dume, en la lingvistiko, ideoj pri lingvolernado kaj pri konstruitaj lingvoj jam maturiĝis tiomgrade ke oni povas almenaŭ imagi ke Esperanto iam fariĝos ordinara temo en la esplorkampoj de lingvistiko.

5 Konkludo

Esperanto kaj la lingvistiko komencis siajn vivojn iom paralele. La patro de Esperanto (Zamenhof) kaj la patro de la moderna lingvistiko (F. de Saussure) vivis dum preskaŭ ekzakte la samaj jaroj kaj ambaŭ “movadoj” komencis trovi sian vojon kaj la respekton de la cetera mondo iam frue en la 20a jarcento. Esperanto estis kreita sub la (nekonscia) influo de la tiama lingvistiko kaj kelkaj fruaj lingvistoj interesiĝis pri Esperanto aŭ partoprenis en la kreado de similaj lingvoj. La vojoj disiĝis poste, kiam ardaĵaj deklaroj de esperantistoj pri sia lingvo koliziis kun la sobra kaj scienca vidpunkto de lingvistoj pri la naturo de la homa lingvo. Samtempe, mankis al la lingvistiko la konceptaj kaj teknikaj rimedoj por kontentige pritrakti tiel kompleksan lingvan fenomenon kiel Esperanton, aparte kiam temas pri la

3 “[...] some brief comments of mine about the origins of Esperanto have been misinterpreted as disapproval of the language or of projects involving the use of Esperanto in facilitating development of language skills. There never was any such implication, or intention” (Publika retpoŝto al Probal Dasgupta, 9 de decembro 2021).

fakto ke ne ekzistas, laŭ tradiciaj kriterioj, denaskaj parolantoj de la lingvo. Dum la lastaj jaroj, tamen, okazis pluraj gravaj ŝanĝoj en la sintenoj kaj de esperantistoj kaj de lingvistoj. La deklaroj de esperantistoj ĝenerale fariĝis iom pli ligitaj al la scienca realo kaj lingvistoj evoluigis esplormetodojn kiuj permesas fruktodonajn alirojn al alproprigo de lingvoj post la infanaĝo kaj / aŭ en netradiciaj cirkonstancoj kaj ekinteresiĝis pri lingvoj kiujn oni konscie konstruas. Ĉu tiuj ŝanĝoj kondukos al nova epoko en kiu ekfloros sciencaj studoj kiuj pritraktas la lingvistikon de Esperanto? Estas ankoraŭ tro frue por scii, sed la grundo pretiĝas kaj burĝonoj komencas videbli.

Bibliografio

- Anderson, Stephen R. 2021. *Phonology in the Twentieth Century*, Second Edition. Berlin: Language Science Press.
- Anderson, Stephen R., kaj Louis de Saussure, red. 2018. *René de Saussure and the Theory of Word Formation*. Berlin: Language Science Press.
- Astori, Davide. 2018. "La fratoj Ferdinand kaj René de Saussure kaj la naskiĝo de la moderna interlingvistiko." *Beletra Almanako* 33: 99-110.
- Bloomfield, Leonard. 1933. *Language*. New York: Holt
- Boulton, Marjorie. 1962. *Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto*. La Laguna: J. Régulo.
- Collitz, Hermann. 1925. "World languages." *Language* 2: 1-13.
- Corsetti, Renato. 1996. "A mother tongue spoken mainly by fathers." *Language Problems and Language Planning* 20 (3): 263-273. <https://doi.org/10.1075/lplp.20.3.05cor>
- Culbertson, Jennifer kaj Kathryn Schuler. 2019. "Artificial language learning in children." *Annual Review of Linguistics* 5: 353-373. <https://doi.org/10.1146/annurev-linguistics-011718-012329>
- de Saussure, Ferdinand. 1916. *Cours de linguistique générale*. Paris: Payot.
- Falk, Julia S. 1995. "Words without grammar: Linguists and the international auxiliary language movement in the United States." *Language & Communication* 15 (3): 241-259. [https://doi.org/10.1016/0271-5309\(95\)00010-N](https://doi.org/10.1016/0271-5309(95)00010-N)
- Forster Peter G. 1982. *The Esperanto Movement. Contributions to the Sociology of Language*. Den Haag: Mouton.
- Francini, Walter. 1978. *Esperanto sen Antaŭjuĝoj*. Rio de Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj.
- Frank, Helmar. 1987. "Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo: Kibernetika teorio kaj empiriaj rezultoj de la Lingvo-Orientiga Instruado de la Internacia Lingvo kiel bazo de pli posta lernado de etnaj lingvoj." En *Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo*, Vol. II: *Esperantismo*, 213-222. La Laguna: Universidad de La Laguna.

- Goodall, Grant. 2023. "Constructed languages." *Annual Review of Linguistics* 9: 419-437. <https://doi.org/10.1146/annurev-linguistics-030421-064707>.
- Hudson Kam, Carla kaj Elissa Newport. 2005. "Regularizing unpredictable variation: The roles of adult and child learner in language formation and change." *Language Learning and Development* 1: 151-195. <https://doi.org/10.1080/15475441.2005.9684215>.
- Jespersen, Otto. 1928. *An International Language*. London: Allen & Unwin.
- Large, Andrew. 1985. *The Artificial Language Movement*. Oxford: Basil Blackwell.
- Newmeyer, Frederick. 1986. *Linguistic Theory in America, Second Edition*. San Diego, CA: Academic Press.
- Peterson, David J. 2015. *The Art of Language Invention: From Horse-Lords to Dark Elves to Sand Worms, the Words Behind World-Building*. New York: Penguin.
- Pinker, Steven. 1999. *Words and Rules: The Ingredients of Language*. New York: Basic Books.
- Piron, Claude. 1977. *Esperanto: Ĉu Eŭropa aŭ Azia Lingvo? Esperanto-Dokumentoj*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Polinsky, Maria. 2018. *Heritage Languages and their Speakers*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Punske, Jeffrey, Nathan Sanders, kaj Amy V. Fountain, red. 2020. *Language Invention in Linguistics Pedagogy*. Oxford: Oxford University Press.
- Sapir, Edward. 1921. *Language: An Introduction to the Study of Speech*. New York: Harcourt, Brace & World.
- Sapir, Edward. 1925. "Memorandum on the problem of an international auxiliary language." *The Romanic Review* 16: 244-256.
- Sikosek, Ziko Marcus. 2001. *Esperanto sen Mitoj: Mensogoj kaj Memtrompoj en la Esperanto-Informado*. Antwerp: Flanda Esperanto-Ligo.
- van Oostendorp, Marc. 2000. "Constructed language and linguistic theory." En *Planned Languages: From Concept to Reality*, redaktis Klaus Schubert, 203-221. Brussels: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst.
- van Oostendorp, Marc. 2018. "The Esperantist background of René de Saussure's work." En *René de Saussure and the Theory of Word Formation*, redaktis Stephen R. Anderson kaj Louis de Saussure, 201-208. Berlin: Language Science Press.
- Versteegh, Kees. 1993. "Esperanto as a first language: Language acquisition with a restricted input." *Linguistics* 31 (3): 539-555.
- Wells, John. 1978. *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.

- White, Lydia. 1989. *Universal Grammar and Second Language Acquisition*. Amsterdam: John Benjamins Publishing Company.
- Yang, Charles. 2016. *The Price of Linguistic Productivity: How Children Learn to Break the Rules of Language*. Cambridge, MA: MIT Press.
- Zamenhof, Ludwik Lejzer. 1903. *Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto*. Paris: Hachette.

Pri la aŭtoro

Grant Goodall estas profesoro pri lingvistiko en la Universitato de Kalifornio, San Diego. Li estas specialisto pri sintakso kaj studas sintaksajn strukturojn kaj procezojn, ilian interagadon kun aliaj kognaj procezoj, kaj la alproprigon de sintakso dum la vivodaŭro. Li estras la Laboratorion pri Eksperimenta Sintakso en la universitato.

Retadreso: ggoodall@ucsd.edu

ORCID: 0000-0003-4652-9009

About the author

Grant Goodall is a professor of linguistics at the University of California, San Diego. He specializes in syntax and studies syntactic structures and processes, their interaction with other cognitive processes, and the acquisition of syntax over the lifespan. He heads the Experimental Syntax Laboratory at the university.

Sobre el autor

Grant Goodall es profesor de lingüística en la Universidad de California, San Diego. Se especializa en sintaxis y estudia estructuras y procesos sintácticos, su interacción con otros procesos cognitivos y la adquisición de la sintaxis a lo largo de la vida. Dirige el Laboratorio de Sintaxis Experimental en la universidad.

Esperanto and linguistics: a hundred years of love and hate

Abstract: The relationship between linguistics and those who use and develop constructed languages like Esperanto was relatively friendly during the early years, became much colder during the subsequent decades, and now seems to be entering a more cooperative and hopeful period. In the early years, there was much mutual influence and collaboration, but during the early decades of the 20th century, the attitude of

linguists towards Esperanto rapidly became negative, partly because of the traditional statements of Esperantists about their language and partly because of unavoidable conflicts between the goals of linguistics and the status of Esperanto as a language. However, by the end of the 20th century, this situation began to change, due to changes both among Esperantists and among linguists. Esperantists less frequently expressed ideas about language learning, the logic of Esperanto, and the diversity of languages in the world that linguists found shocking and unacceptable, and in linguistics, ideas about language learning and constructed languages matured to the point where one can now at least imagine that Esperanto could become an ordinary topic in linguistic research.

Keywords: Linguistics; Esperanto; Language learning; Language diversity; Constructed languages; Chomsky.

El Esperanto y la lingüística: cien años de amistad y odio

Resumen: La relación entre la lingüística y aquellos que usan y desarrollan lenguas construidas como el Esperanto fue relativamente amistosa durante los primeros años, se enfrió mucho durante las décadas siguientes y ahora parece estar entrando en un período más cooperativo y esperanzador. En los primeros años hubo mucha influencia y colaboración mutua, pero durante las primeras décadas del siglo XX la actitud de los lingüistas hacia el Esperanto se volvió rápidamente negativa, en parte debido a las declaraciones tradicionales de los esperantistas sobre su idioma y en parte debido a conflictos inevitables entre los objetivos de la lingüística y el estatus del Esperanto como idioma. Sin embargo, a finales del siglo XX, esta situación comenzó a cambiar debido a cambios tanto entre los esperantistas como entre los lingüistas. Los esperantistas expresaron con menos frecuencia ideas sobre el aprendizaje de idiomas, la lógica del Esperanto y la diversidad de lenguas en el mundo que los lingüistas encontraban impactantes e inaceptables, y en la lingüística, las ideas sobre el aprendizaje de idiomas y las lenguas construidas maduraron hasta el punto en que ahora al menos se puede imaginar que el Esperanto podría convertirse en un tema ordinario en los campos de investigación de la lingüística.

Palabras-clave: Lingüística; Esperanto; Aprendizaje del lenguaje; Diversidad lingüística; Lenguas construidas; Chomsky.